

## Klerigaj agadoj kaj kapabligo dum la kongreso



La kongresa laborsemajno komenciĝis per la jam tradicia programo de la KLERIGA LUNDO, organizita de Claude Nourmont. La aranĝo ĉi-jare ofertis varian serion de 15 altnivelaj prelegoj kaj seminarioj disvolviĝintaj antaŭ plenaj salonoj.

Mardo estis la *Tago de la Lernejo*, tuttaga programo de ILEI, ĉi-jare organizita de Maria Beloŝeviĉ. La 12 prezentoj trateksis la multflankajn aspektojn de la instruado de nia lingvo, de organizaj demandoj tra metodoj, konkreta apliko ĝis prilingva klerigado. La tagon finis vigla diskuto.

Dumkongrese jam de 10 jaroj okazigas paroligajn kursojn la retejo [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La 16 lecionojn partoprenis tage, je ambaŭ niveloj, po 50-60 personoj, lernemuloj kaj observantoj de la metodoj de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge.

Kadre de tiu aranĝo okazis ankaŭ duhora preparsesio por la ekzamenkandidatoj.

En Rejkjaviko estis organizita la 36a KER-sesio, al kiu aliĝis 20 personoj, el 13 landoj. Aparte laŭdendas la 7 finnaj samideanoj, kiuj simile al pluraj aliaj, per la nuna ekzameno kompletigis sian skriban ekzamenon, trapasitan dum la dua tutmonda ekzamentago en junio. Tiam sub la reĝisorado de Katalin Kováts, en unusola tago 239 personoj ekzameniĝis samtempe en 24 lokoj de 16 landoj. Fine de la kongreso, kadre de mallonga festo Katalin Kováts kaj Renato Corsetti, en la nomo de la ekzamenkomisiono de UEA, transdonis la atestilojn al la reprezentantoj kaj partoprenintoj de la Dua Tutmonda Ekzamentago el Meksiko, Argentino, Brazilo, Nikaragvo, Kolombio, Usono kaj Japanio.

**Inklude la rejkjavikan sesion, la KER-ekzamenon ĝis fino de julio trapasis 1326 personoj el 60 landoj.**

La nova ekzamensistemo de UEA, bazita je la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj agnoskata de la Konsilio de Eŭropo kaj de la Asocio de Lingvostestistoj de Eŭropo, havas pli da diplomitoj ol la nombro de la partoprenintoj de la kongreso. Grandan dankon meritas ĉiuj, kiuj per organizaj laboroj aŭ ekzameniĝo helpas en la ekstermovada agnoskigo de Esperanto kaj altigo de ties prestiĝo.

En la sekvaj jaroj, konscie gvidataj de la nova estraro kaj de la strategia plano de UEA, ni laboru diligente sur la kampoj de edukado kaj kapabligo kaj havu 2 000, 5 000, 10 000 esperantistojn, kiuj per ekstermovade agnoskitaj dokumentoj povas pruvi la forton kaj la kvalitojn de nia lingvo kaj movado.

Katalin Kováts, redaktoro de [www.edukado.net](http://www.edukado.net), Kn. 718.